D-ro Inĝ. E. Wüster: **Spertoj, konsideroj kaj proponoj rilataj al la UDK-simboloj.**

La UDK-indicoj konsistas el puraj nombroj (ekz. 621.3) kaj UDK-simboloj (ekz. 0 : = —). La aŭtoro, d-ro E. Wüster, kiu jam de ĉirkaŭ 35 jaroj uzas la UDK-on en vasta mezuro, diskutas en kvar artikoloj kelkajn spertojn, konsiderojn kaj proponojn rilatajn al la simboloj de la UDK.

Ĉi tiuj artikoloj (kies unuaj du jam aperis [1])) estas titolitaj:

I. La sinsekvo de la UDK-simboloj.
II. La videbla kaj la nevidebla alfabetigoj de la UDK-simboloj.
III. La termoj (elementoj) intermeteblaj de la UDK kaj ilia alfabetigo.
IV. La simboloj de plivastigo kaj ilia alfabetigo.

(I) Ĉi tiu studo pri la sinsekvo de la UDK-simboloj unue distingas la sinsekvon de indicado (kodigo, ĉifrado) kaj la sinsekvon de enordigo (klasado, envicigo, enkartarigo). La sinsekvo de indicado estas la sinsekvo de la simboloj de unuopa indico (ĉifro), la „horizontala" sinsekvo. La sinsekvo de enordigo estas la sinsekvo de la unuopaj indicoj en katalogo, kartaro aŭ biblioteko, la „vertikala" sinsekvo. Ofte okazas ke al malsamaj personoj estas komisiitaj la indicado kaj la enordigo. La ordigisto havas taskon multe pli simplan. La aŭtoro starigas la principon ke la sinsekvo de la enordigo devas esti la inverso de la preferinda sinsekvo de indicado, kaj li klarigas kial.

Poste li reestablas la principon ke ĉiuj indikoj UDK-indicaj rilataj al la kielo de prezento de publikigaĵo devas sekvi post la indikoj pritemaj. Ĉi tiun principon jam proklamis la 2ª kompleta eldono de la UDK, sed ĝi perdiĝis en la 3ª. Cetere, eĉ en la 2ª ĝi estis aplikata nur ne-konsekvence. Oni ne komprenis ke loko kaj tempo ne ĉiam apartenas al la temo, sed foje ankaŭ al la kielo de prezento. Simile oni pretervidis ke, kontraŭe, *la lingvo* (la franca resumo erare diras *„le temps"*) ne ĉiam estas trajto de la maniero de prezento, sed foje apartenas al la temo. Pro ĉi tiu duobla uzo de kelkaj UDK-simboloj igis sin sentata la bezono fiksi difinitajn simbolo-sinsekvojn rilatajn al resp. la temo kaj la maniero de prezento. Krome montriĝis la neceso signi en ia evidenta maniero kie en la ĉifro komenciĝas la indikoj pri la kielo de la prezento.

Fine la aŭtoro ekzamenas la ĝenaĵojn rezultantajn el la ĝisnunaj reguloj pri la sinsekvo de la ĉifreroj, reguloj starigitaj pli-malpli hazarde. La aŭtoro pledas, ke la nepra sinsekvo de enordigo estu: **ĝis/; kaj +; ĉefa nombro 0/9;** (rilate al la kielo de la prezento) **fremda termo A/Z, N-ro; tempo „"; loko (1/9); raso (=); lingvo=; formo (0);** (rilate al la temo) **fremdaj termoj A/Z, N-ro; tempo „"; loko (/9); loko ĉiela (*); raso (=); lingvo =; rilato :;** (rilate al temo aŭ kielo de la prezento) **aparta helponombro —; mankantaj ciferoj ...; vidpunkto .00; aparta helponombro .0; aldonaj decimalaj ciferoj 0/9.**

[1]) (I) en FID XVIIIth Conf. 1951 (15 p); (II) en Rev. Doc. 19 [1952] 39—49.

La preferinda sinsekvo de indicado estas la inverso de la ĉi-supra kiom koncernas tiun parton kiu sekvas post la **ĉefa nombro.**

Tamen, ĉi tiuj reguloj bezonas kelkan klarigon: por la enordigo oni rigardu la tutan ĉifron (indicon) kiel unu tuton kun donita sinsekvo de la eroj, nome tiu sinsekvo kiun skribis la ĉifristo (indicisto, kodisto). Ĉi tio montriĝas klare en ekzemploj donitaj en (II).

(II). En ĉi tiu artikolo la aŭtoro proponas anstataŭigi ĝisnunajn simbolojn (ekz. **(0)**, **(1/9)**, =, ktp.) per minuskloj, kaj krome enkonduki ankoraŭ plurajn aliajn minusklojn kiel simbolojn. La literoj kiujn li proponas, kontentigas du postulojn: unue kaj ĉefe: ilia alfabeta sinsekvo respondas al la sinsekvo postulita por la enordigo, kaj due kaj akcesore: ili estas elektitaj tiaj, ke estas facile memori ilian signifon, ekz. **p** por lingvo pensigas pri parolo kaj asociiĝas al la ĝisnuna simbolo = per la vorto paraleloj.

Ŝajnas al mi ke la enkonduko de ĉi tiuj litersimboloj grave plibonigos la UDK-on, faciligus la ĉifradon, kaj eĉ ebligus permaŝinan enordigon de la ĉifroj. Esperu ni ke ne tro longe oni prokrastos la alprenon de ĉi tiuj evidente bonege pripensitaj kaj elprovitaj proponaĵoj.

La pasintjara kongreso de la Fédération Internationale de Documentation (Kopenhago, Oktobro 1952a) starigis internacian komisionon por UDK-simboloj, kiu devos studi ankaŭ la proponojn de d-ro Wüster.

Fine estu al mi permesite fari unu sugeston: Ŝajnas al mi ke la UDK-fremda kategorio bezonas ankoraŭ aldonajn regulojn kaj simbolojn por la envicigo laŭ korekta ordo.

W. P. Roelofs.

025.46 : 408.92

M. C. Butler, **Klasifo de esperantaj temoj,** Eldonita de Esperanto Film-Grupo, Bergen-op-Zoom, Nederlando. — 144 paĝoj. — Prezo: 10 anglaj ŝilingoj, plus afranko.

La vivo konsistas el aro da malfacilaĵoj, kiujn oni devas solvi. Antaŭ tiuj malfacilaĵoj, la homo reagas inventante ilojn, kiuj faciligas lian lukton kontraŭ ili. La sumo de tiuj faciloj kreitaj de la homo konsistigas la kulturon. — La ideoj, kiujn pri la objektoj ni faras al ni, estas la plej tipa ekzemplo de tiu ilaro, kiun ni metas inter ni kaj la malfacilaĵoj, kiuj nin ĉirkaŭas. Klara ideo pri iu afero estas kvazaŭ admirinda aparato, kiu igas ĝian angoran malfacilon vasta kaj facilmova senpeno. Sed la ideo estas pasema, rapidfluga; necesas do, ke la memoro penu por ĝin konservi. Sed la memoro ne kapablas konservi ĉiujn niajn proprajn ideojn, kaj tre gravas, ke ni povu konservi eĉ tiujn de aliaj homoj. Tiom ĝi gravas, kiel diras la hispana pensulo Ortega y Gasset, ke ĝuste estas tio, kio plej karakterizas la homan naturon. La hodiaŭa tigro devas esti tigro kiel se ne estus antaŭe ekzistintaj aliaj tigroj; ĝi ne profitas la miljarajn spertojn, kiujn faris ĝiaj similuloj en la sonoraj profundoj de la sovaĝaj praarbaroj. Ĉiu tigro estas unua tigro; ĝi devas lerni de la komenco sian tigran profesion. Sed la hodiaŭa homo ne komencas sian homiĝon, sed heredas jamajn formojn de sia ekzisto, ideojn, vitalajn spertojn de siaj antaŭuloj, kaj li ekiras de la nivelo, kiun konsistigas la homa

pasinto akumulita sub liaj plandoj. — Jen do kial estis tiel grave aldoni al la ilo, kiun reprezentas la ideo, alian ilon, kiu faciligos la malfacilon konservi la ideojn. Nu, tiu instrumento estas *la libro*.

Sed kiel la dio kreis anĝelon de mistikaj flugiloj kaj tiu anĝelo ribelis kontraŭ li, tiel la homo kreis la libron, kaj ĉi tiu, fabele kreskinte, same ribelis, minacante la ekziston de la homo kaj lin sklavigante. La ekonomio, la teĥniko, facilaĵoj inventitaj de la homo, lin sieĝas kaj minacas strangoli. La sciencoj, fabele kreskinte kaj kreskante, memoble kaj disbranĉe, transpasas la akirajn kapablojn, kiujn la homo disponas, kaj lin angorigas kaj subpremas, kvazaŭ plagoj de la naturo. La kulturo, kiu liberigis la homon disde la prarbaro, lin ree ĵetas en la arbaron, ne malpli sovaĝan kaj sufokantan, kiun konsistigas la libroj .....

Konscia pri tia problemo, subtenata de eksterordinara amo al esperanto kaj apogita en faka kompetento nekomuna, s-ro M. C. Butler frontis la timegindan, terurigan entreprenon elstarigi, en la preskaŭ virga — kun tre apartaj kaj propraj ecoj — esperanta tereno, sisteman aposterioran klasifon de ĝia temaro, ĝin sinsekve adaptante al la lastaj eltrovoj de la bibliotekonomio. Lia verko do ne estas kreita, apriore ellaborita, sed — kio plej gravas — kreskinta el la vivo mem de la esperanta literaturo, dum 30-jara tralaborado kaj aplikado en la Biblioteko de BEA. La brila rezulto estas la misia libro de s-ro Butler, kiu ja estas kvazaŭ filtrilo inter la studemulo kaj nia presa trezoro, sekura gvidilo por nefakano same kiel por fakulo tra la sovaĝa densejo de la jam mirige kreskinta esperantologio. S-ro Butler do iĝis kvazaŭ la ĉefkuracisto kaj higienisto de niaj estontaj disertaciantoj, ĉar certe lia libro, en nia plej proksima futuro, estos pli helpodone konsultata — pro sia sistema analizo de la lingvo kaj de la movado — de studemuloj dezirantaj profundigi sub majstra gvido konkretan branĉon de nia afero, ol de la ankoraŭ malmultaj bibliotekistoj de Esperantujo. Tial do la libro estas multrilate tre utila ekster sia propra bibliotekista rondo, kaj ne laste eĉ por niaj vortaristoj kaj leksikologoj, ĉar ĝia kristale klara montro de la diversaj eroj, kiujn ĝi ampleksas (vidu, ekz., E 91/97 Tropoj, Parolfiguroj), eminente gvidas kaj mem donas terminajn difinojn. — Ekster Esperantujo, la verko povas esti fiere montrata, ĉe gravaj instancoj, kiel mi faris, al profesiaj bibliotekistoj, kiuj ĝin admiris kaj senrezerve laŭdis ĝian funde elvolvitan kaj koheran detaladon, kaj la seriozon de movado, kiu kreskigis tian libron. Laŭ juĝo de fakuloj, kiuj ĝin vidis, la libro estas ja modela, utila eĉ por klasifoj de aliaj lingvoj. Oni asertis, ke la decimalistoj jam ne povos ignori ĝin!

Probable kabinetuloj trovus pecojn aŭ gvidliniojn, kiujn ili volus disponi alimaniere en la libro; kaj verŝajne aliaj laŭdos ..... kun sed-oj! Kontentigi ĉiujn egalas kontentigi neniun. Sed labori, jen kio plej valoras, kio efike utilas. Kaj la *Klasifo* estas bela rezulto de digna kaj ama laboro plenumita de serioza spertulo.

Klaran resumon de la libro kompetente donas s-ro Brian F. Bone en „The British Esperantist", 1952, 191; kaj estus tede ĝin ripeti. Tamen mi devas insiste emfazi la fakton, ke nia movado estas danke ŝulda al la eldonisto s-ro Dercks, kiu disponigis al ni libron, kiu tutcerte profitos al li nur la ĝojon esti servinta noblan ideon kaj plezurinta la bonan s-ron Butler.

La grandan eventon — nun preskaŭ senehan, sed certe ŝlosilan por kompreno de estontaj sukcesoj —, kiun la apero de la *Klasifo* reprezentas, apenaŭ povas minusigi ĝia nebela kaj malriĉa tipografio, la preserara svarmo (pli ol cent, sed plejparte ne gravaj kaj jam listigitaj), la malfortikaj kovrilo kaj broŝurigo, ktp. Tia libro, kia estas la *Klasifo*, meritas baldaŭan duan eldonon, kun senerarigoj, aldonoj (eble rilat-tema indekso kun numeromontro), pli strikta interna alĝustigo, zorgo tipografia, ktp. Sed mi sincere kredas, ke oni ne bezonas esti profeto por antaŭvidi, ke tiu eldono efektiviĝos.

Resume: s-ro Butler, elitulo, faris porelitan laboron, kiu eminente seriozigis kaj gravigis Esperantujon. Al li nian dankon.

J. Régulo-Pérez, Kanariaj Insuloj.

378.18.06 = 089.2 : 061.32(100) (43)„1952.08"

Raporto pri Internacia Konferenco de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj, Schluchsee, Germanujo, 17-24. VIII. 1952, eldonita de IFESA, Laksegade 35, Kopenhago K, Danujo. Multobligita, 20 paĝoj, 213 × 302 mm²; prezo: 3 danaj kronoj aŭ 5 rpk.

La konferenco traktis jenajn temojn:

A. La sociaj problemoj de la Studentaro en diversaj landoj, nome: Nederlando, Jugoslavujo, Danlando, Italujo, Usono;
B. Internacia studenta laboro, (Germanujo, Nederlando, Jugoslavujo, Danlando, Usono);
C. Scienco kaj Esperanto,
(IFESA), kiun oni fondis dum tiu konferenco;
Ĉ. Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj.

Krome estis ankoraŭ eksterprogramaj prelegoj kaj diskutoj. La Raporto ankaŭ enhavas la Statuton de IFESA. Mi nur rimarkigu, ke la preskribo en paragrafo 8, ke „la decidoj estas aprobataj(?) per plimulto de voĉoj, ne kalkulante la sindetenajn", estas nepre ne sufiĉa.

413.232 = 089.2 = 56(023)

Llave del Esperanto, „Esperanto-ŝlosilo" por hispanlingvanoj, eldonita en Urugvajo. Prezo: US $ 0.08; rabato 15, 20, 25 kaj 30 % je samtempa mendo-pago de 10, 25, 50 aŭ 100 ekz. resp. Mendebla ĉe d-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida), Urugvajo (kun UEA-konto).